

# Ateismo

Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto Organizo

<http://www.gazetoteko.eu/ateo/ateo7.pdf>



## La celoj de ATEO

- 1 **Kunligi** esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- 2 **Disvastigi** Esperanton inter ateistoj.
- 3 **Defendi** propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- 4 **Instigi** ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- 5 **Akceli** racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altiĝi la intelektan kaj kulturen nivelon de Esperantujo.
- 6 Libere **diskuti** kaj **analizi** ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
- 7 **Malkateni** la mensojn!

N° 7-a

Aprilo 2007

## Vortoj de l' Prezidanto:

Karaj samideanoj, en la vera signifo de la vorto,

Jen denove nia bulteno ATEO! La redaktora teamo pligrandiĝis: akceptis kunlabori du francaj membroj Christian Rivière kaj Dominique Simeone. Dankon al ili kaj al ĉiuj kunlaborintoj por tiu ĉi numero. Bedaŭrinde en 2006 ne eblis aperigi la bultenon, tamen tio tute ne signifas, ke nenio okazis en la asocio.



Kiel kutime la kun-sidoj administra kaj foruma dum la Universalaĵ Kongresoj en Vilno en 2005 kaj en Florenco en 2006 allogis multajn homojn kaj naskis interesajn debatojn. En Vilno nia forumo temis pri “reviviĝo de religioj en la post-sovetaj landoj”, kaj venis ege viglaj reagoj de partoprenantoj el Rusio, Serbio, Ĉeĥio, Bulgario kaj ceteraj landoj de tiu mondparto. “Religio en la lernejoj” estis la temo de la forumo en Florenco, kaj diversaj prelegantoj parolis pri la instruado de religio en la loka lando, Italio (el vidpunkto de instruisto kaj de lernanto), pri la speciala kazo de instruado de religio en Alzaco-Mozelo (nordorienta Francio), pri la situacio en Svislando, en Kanado, en Israelo, en Usono, en Japanio. Pluraj el la intervenoj aperas en tiu ĉi numero.

ATEO havis budon inter la aliaj fakaj asocioj kaj partoprenis en la forumo de fakaj asocioj.

En Florenco ni krome partoprenis la Movadan Foiron, novan aranĝon, kie landaj asocioj kaj fakaj asocioj havis la okazon prezenti sin. Tie ĉe tablo ni povis informi pri ateismo kaj nia asocio. Por vigligi la aferon, estis prezentitaj diversaj opinioj de famuloj, kiujn vi trovos en tiu ĉi bulteno ĉe la rubriko “Kion ili diris”.

Interesa novaĵo: en kajero 19 (2006) de germana altnivela fakrevuo «Humanismus aktuell» (humanismo aktuale), de la serio «Hefte für Kultur und Weltanschauung» (Kajeroj pri kulturo kaj mondkoncepto) aperis artikolo de Detlev Blanke pri la rilatoj inter Esperanto kaj ateismo. La kajero traktas la temon «Freidenkerisches Erbe» (liberpensula heredaĵo). La 120-paĝan kajeron eldonis «Humanistische Akademie Berlin e.V.» (Humanisma Akademio Berlino, registrita asocio). La artikolo montras kiun rolon ludis/ludas Esperanto praktike en la ateisma movado. Tute rimarkinde estas la interesiĝo de tiu ateisma/humanisma revuo al Esperanto.

Ĝis baldaŭ en Jokohamo, aŭ sur la reto, ateisme via,

*Claude Mourmont*

### Noto de la redaktoro

Delonge ni ne venis antaŭ vi, leganto. Je la florenca Universala Kongreso ŝajnis, ke estas nova redaktoro de **Ateismo**, aŭ almenaŭ kunredaktoro. Prezidantino Nurmon' diris al mi, ke li kontaktos min, kaj fakte homo min diris, ke li *estas la nova redaktoro de Ateismo*. Mi, sekve, ripozis kaj atendis ankoraŭ eventojn. Sed la evento, kiu venis al mi estis peto de la Prezidantino, ke bultenon mi faru, kaj artikoloj venis tiucele. Mi, sekve, pretiĝis denove la bultenon, kaj esperas, ano kaj leganto, ke la dokumento, kiun vi nun tenas antaŭ vi, ĝuu vian aprobon kaj intereson.

*Jesuo de las Heras*

### Enhavo

Religio kaj estonteco .....	3
Protokolo kunveno de 2006 .....	4
Pri principo de laikeco .....	5
Kion ili diris .....	6
Al kaj el la ĉielo .....	8
Instruado de religio Italio .....	10
El studenta vidpunkto .....	13
Heredu la venton .....	14
L' medalo al l' Papo .....	15

## **Religio kaj estonteco**

De kie ni venis? Kien ni iras?

Milfoje faritaj demandoj, kiuj ne havas aŭ havos respondon.

Nia misio: ĉu vivi feliĉaj anstataŭ esti utilaj?

Ni konu pli bone naturon, onin mem en ĝi, ĝiajn kaŭzojn kaj efektojn, sed tiujn mezureblajn, ne tiujn “filozofiajn”: nia feliĉiĝo venas el tio, ke ni estas utilaj, kaj samtempe ni ĝuas ĝin. Nia pago venas el esti, ni ricevas pagon pro fari, neniu ŝuldas ion al ni.

El kie ni venas, kien ni iras? Kio gravas?

Ni venas el evoluo, kaj ni iras ekzakte en la naturon, el kie ni venas. Estis komenco, kaj ankaŭ estos fino. Tio estas tiom nekredbla, kiel tio, ke ĉiam ekzistis ĉio, kaj ĉiam ekzistos ĉio. Tio estas bona temo por ke astronomoj esploru kaj faru teoriojn, kaj finfine venos al la sama punkto.

Por respondi nerespondeblon, oni inventis ĉiajn kredojn kaj religiojn, profitante kelkajn socialajn klasojn por sanigo, kontrolo, subpremado, negoco kaj politiko.

Ĉiuj religioj bezonas dion, kiu estas la kaŭzo de ĉio, kion ni ne komprenas. Cele al subtenado de tiu mito, estas necese, ke oni unue starigu aron da dogmoj, sur kiuj oni konstruas strukturon ĝenerale egan, kompleksan, luksan kaj elmontriĝeman, kiu subtenas ties kredeblecon.

Malfeliĉe, kiam oni paroladas aŭ diskutas pri religioj, oni pritraktas ties strukturon, historion, sekvojn, filozofion de la koncerna religio, sed oni esploras tro malmulte pri la principoj, la bazoj, dogmoj, kio estas tio, por kio oni ne havas eksplikon, kaj oni devas kredi ilin devige, ĉar alimaniere religio ne havas kialon ekzisti.

Tiuj dogmoj ĝenerale estas enpremitaj, skulptitaj troige, kvankam preskaŭ ĉiam pro bona fido aŭ senscienco, en la mensoj de infanoj, fare de ilia komunumo, sed ĉefe de la gepatroj kaj ĉefe de la patrino, ĉar ŝi kunvivas kun siaj geinfanoj multe pli da jaroj.

Evidente, tiujn dogmojn oni ne pridemandas: ili estas tiaj, kaj oni devas kredi ilin devige. Tion oni nomas fido.

La marko en la menso de la infano kaj de la adoleskanto estas tiom profunda, ke eĉ post multaj jaroj da studo kaj travivaĵoj, ili persistas, eĉ se logiko, analizo kaj scio pri dogmo, kaj sekve ĉio alia, indikas, ke ĉiuj religioj estas mitoj, kaj nenio estas vera.

Tiu infana traŭmo restas en la plenkreskulo, eĉ se li estas klera, kiel timo kaj dubo, ĉar vidante organizon tiom grandan kiel eklezion, kredas, eĉ se li ne malferme praktikas sian religion, interne lia timo persistas, kune kun liaj duboj. Timo al skandalo igas nekredemulojn ŝajnigi, ke ili kredas pri io, ĉar ekzistas la antaŭjuĝo, ke tiu, kiu kredas pri nenio ne estas fidebla, kaj oni signalas kaj ekskludas lin aŭ ŝin el sia etoso aŭ komunumo.

Venos la tago, kiam plimultoj liberiĝos pri religioj (mankas jarcentoj, ni bezonas multe da progreso teknologia, eduka kaj diskoniga), kaj tiam estos pli da mensa libereco por fari kaj doni, kio estas tio, kio feliĉigas nin dumvive, ĉar ni ne atendas dion, kiu faros tion, kaj ni ne plu kulpigos lin pro tio, ke li ne faros tion, kaj ni ne havos konformismon aŭ sindonon, kiu en alia tempo aŭ loko punos aŭ premios nin.

Tio faciligos la vojon al demokratio kaj respekto pri homo tiel, kiel li aŭ ŝi estas, sen distingi iel ajn. Posedi estos pli juste rilate al la ebleco produkti kaj ne al ebleco subpremi, ĉar ni estos multe malpli subpremeblaj.

**Elkore,**

*CVB*  
*(Carlos Venegas Brito)*

## **Ateisma Tutmonda Esperanto Organizo**

### **Protokolo de la administra kunveno de 2006**

En Florenco, Italio, la 1an de aŭgusto 2006, Claude Nourmont prezidas, kaj Yves Bellefeuille protokolas.

Ĉeestas cirkaŭ 30 homoj. Claude Nourmont, la prezidanto, konstatas kun ĝojo ke la salono estas plena. Ŝi prezentas sin mem kaj Yves Bellefeuille, la sekretario. En la UK ankaŭ estas Dieter Rooke, Anna Löwenstein kaj Jesuo de las Heras.

Claude diras, ke ne estis multe da agado dum la pasinta jaro. La bulteno ne aperis. La kunveno de hodiaŭ estas administra kunveno; morgaŭ okazos la publika forumo, kiu estas multe pli interesa. La publikaj forumoj bone funkciis dum la lastaj jaroj. Claude diras, ke la organizo estis kreita, por ke ne ekzistu nur religiaj kaj spiritismaj asocioj en la esperanta movado. La organizo tamen ne ekzistas nur surpapere.

Ŝi demandas, ĉu aperu papera bulteno, aŭ ĉu la bulteno estu nur reta. Ĉiuokaze oni bezonas redaktoron por bulteno. Jesuo, la nuna redaktoro, ne ĉeestas; li malsanis dum kelkaj monatoj.

Claude demandas pri kandidatoj por redakti la bultenon. Ŝi klarigas, ke redaktoro ne nur atendu artikolojn; li ankaŭ instigu, ke oni verku artikolojn. En la venonta numero de la bulteno aperu la protokolo de tiu ĉi kunveno kaj la kontribuoj de la publika forumo.

Dieter demandas, ĉu Jesuo definitive rezignis pri la redaktado. Claude respondas, ke li lastatempe ne povis prizorgi la bultenon, do oni havu redaktoran teamon.

Dominique Simeone kaj Christian Rivière pretas esti en redaktora teamo.

Dieter raportas ke ni havas inter sesdek kaj sepdek membrojn kaj ke la kaso estas «ekvilibra».

Georges Lhuissier komentas, ke post pago de kotizo, oni ne scias ĉu la kotizo estis «akceptita»: oni ne ricevas konfirmon. Claude respondas ke la problemo estas, ke UEA ne informas nin rapide pri la pagitaj kotizoj. Ni klopodos solvi tiun problemon.

La temo de la publika forumo estos «Religio en la lernejoj». Estos jenaj kontribuoj: Gabriele Corsetti kaj Nino Vessela pri italaj lernejoj (el la vidpunkto de lernanto kaj de instruisto respektive), Arnold Victor pri Usono, Yves Bellefeuille pri Kanado, Cvi Solt pri Israelo, Claude Nourmont pri Alzaco-Loreno kaj José Antonio Vergara pri Argentino, Ankaŭ parolos Dieter aŭ lia filo. La forumo daŭros horon kaj duono.

Yves raportas pri la «movada foiro» kiu okazis dum la interkona vespero, Dominique aldonas kelkajn vortojn. La faka budo okazos mardon; Yves deĵoru. La faka forumo okazos vendredon; Yves ankaŭ ĉeestu ĝin por la organizo. La kotizo estas 15 eŭroj por du numeroj de la bulteno. Oni povas pagi ĝin al Dieter. Dieter esprimas kontenton pro la reta prezento de la bulteno. Oni sugestas, ke estu saluto de la organizo al la franca liberpensa asocio.

Christian demandas, ĉu oni daŭrigu la sistemon laŭ kiu kotizo validas por 2 numeroj de la bulteno. Claude respondas ke estas necese havi kotizon ankaŭ por pagi la koston de la salono dum la UK.

*Yves Bellefeuille*

## **Pri Principo de Laikeco**

Ĝis nun mi verdire neniam multe agadis por nekredemo aŭ ateismo. Nek en mia franclingva medio nek en la esperantlingva. Socie kaj familie, religio min plimalpli ignoris, kaj ĝis nun, mi tion dankeme recipokis. Tiel mi kviete malatentis la problemon.

Sed du eventoj ŝanĝis tiun mensostaton: unue mia partopreno al du Universalaj Kongresoj (en Berlino kaj Zagrebo), dum kiuj mi sentis premon pro iuj religiaj agadoj sistemaj, trudaj kaj insistaj, kiuj min iom ŝokis, ĉar ĝis tiam Esperanto aspektis kiel perfekta modelo de racienco, kreativeco kaj logiko; due kaj pli freŝdate, grave evoluis la politiko de mia lando (Francio), verŝajne sub la influo de emo niveligi tra Eŭropo la leĝarojn koncerne la religiojn, kaj certe sub premo de iuj religiaj komunumoj.

Mi precizigu ke en mia lando, ekde 1905, iu leĝo asertas la disiĝon de la ŝtato kaj de la religio. Tiu leĝo (ĉefa peco de pli ĝenerala sistemo nomata laikeco), ja plej ofte efektive aplikata, forsendas religiajn (same kontraŭreligiajn) ideojn ekster la perimetron de la publika sfero (i.a. de publika lernejo) al la privata konsciencoteren. Ĝi certigas la liberecon kredi aŭ ne kredi, sed draste malpermesas enstrudiĝon de religio en la lerno-programoj, kaj limigas ĝin en la publika vivo ĝenerale (afiŝado, radiaj kaj televidaj elsendoj). Fakte tiu leĝo restas sufiĉe svaga koncerne la vestajn problemojn, pri la rajto surhavi insignojn, markojn, vualojn, ĉapojn, eĉ kiam tiuj estas evidente religiaj, kondiĉe ke ili restu «diskretaj» en publikaj lernejoj. La vesto-sinteno estas fakte afero privata, eĉ se kelkaj aspektoj (krucoj

kaj vualo) ne estas, laŭ mia propra opinio, pruvo de socio-evoluinteco. Pretekste de nur kelkaj kazoj en la tuta lando, de rifuzo formeti sian vualon (pro trudo de familia medio), oni bakis novan leĝon unuavide pli severan (eksigo de ĉiu knabino kiu rifuzos formeton de sia vualo dum la kursoj, kvazaŭ ne estus preferinde ilin eduki anstataŭ ilin eksigi!) La registaro krome inside sugestas pri nova koncepto de «malfermita laikeco», t.e. pri neceso malfermi la instruadon al prezentado (pretekste de historio kaj kono de civilizadaj nocioj) de ĉiuj religioj. Ni neniam sufiĉe firme denuncos tiun «malfermitan laikecon», kiel mortigan atencon al la vera laikeco, agreson kontraŭ la nekredantoj, atakon kontraŭ la plej bazaj principoj pri disiĝo de respubliko kaj religio.

Rezulte de ĉio ĉi, oficiale kadre de necesaj demokrataj debatoj pri la «vuala problemo» kaj pri la nova leĝo, oni pli kaj pli abunde parolas pri religio ĉe televido, radioelsendoj (eĉ publikaj), en gazetartikoloj. Religiaj titoloj (via Religio-moŝto) estas senĝene uzataj franclingve. Dimanĉe diservo makulas radioprogramon. Nia ministro pri «Internaj Aferoj ...» nun aldone titoliĝas «... kaj de Kultoj» ! Mi esperas ke oni ne baldaŭ estos devigata pardonpeti pro sia senreligieco. Feliĉe ni ankoraŭ ne troviĝas en tiom tikla situacio, sed la fakto ke la plejmulto de la eŭropaj landoj ne obeas laikajn principojn ja estas maltrankviliga. Sed mi ne volas tedi vin plu, pri okazajoj de mia lando. Ni efektive konstata ke ateismo estas grava komponanto de nia movado. Tiu komponanto bezonas ekzisti. Sed en rilato kun mia antaŭa babilado pri laikeco, mi deziras

ĉi tie formuli demandon, esperante reagojn kaj vidpunktojn de aliaj legantoj. Ĉu la ateista komponanto (ATEO) ne povus iniciati por starigi kaj proponi al la cetero de la movado, principojn (ekz. en la statuto de UEA) inspiritajn de laikaj konceptoj? Mi pensas interalie pri la instruado de la lingvo mem (metodoj, studlibroj, tekstoj studataj, ...). Tio povus certigi ian protekton kontraŭ eventuala premo de religiaj grupoj (mi pensas pri la plej sektecaj; cetero ne pensu ke tia risiko ne ekzistas), sed precipe tio povus iel faciligi la agnoskon de Esperanto en la instruado-programoj de plej diversaj (ne «diservaj»!) landoj, interalie en la laikaj. Efektive lingvo tro sorbita de religiaj ornamaĵoj povus bremsi sian ŝancon esti oficialigita, kaj krome, eble limigas la entuziasmon por nia lingvo, de kelkaj homoj kiuj nature ne emus membriĝi al movado obeanta ne sufiĉe klarajn principojn tiurilate.

*Christian Rivière*  
Francio



## **Kion ili diris**

**Oscar Wilde** (1854-1900), verkisto

La vero, kiam temas pri religio, estas simple la travivinta opinio.

*The Critic as Artist* (1891).

**Voltaire** (1694-1778), filozofo kaj verkisto

Se ni kredas absurdaĵojn, ni faros teruraĵojn.

**Taslma Nasrin** (verkisto kaj feministo)

Mi estas ateisto. Mi ne kredas je preĝoj, mi kredas je laboro. Kaj mia laboro estas verkado. Mia skribilo estas mia armilo.

**Lemuel K. Washburn**, liberpensulo

Miraklo ne estas klarigo de tio, kion ni ne kapablas kompreni.

*"Is The Bible Worth Reading?" and Other Essays* (1911).

**Albert Einstein** (1879-1955), fizikisto

La etika konduto de homo devus baziĝi praktike sur kunsentado, edukado, kaj sociaj ligoj kaj bezonoj; neniu religia bazo necesas. La homo efektive estus mizerulo, se necesus bridi ĝin per timo de puno kaj espero pri postmorta rekompenco.

*"Religion and Science," New York Times Magazine*, 9 nov 1930.

**Aristotelo** (?-384-322 aK), filozofo

Preĝoj kaj oferoj estas senefikaj.

**Friedrich Wilhelm Nietzsche** (1844-1900), filozofo

"Fido" signifas la volon eviti scii tion, kio estas vera.

*The Antichrist*.

**Mark Twain** (1835-1910), verkisto

Se la Eĵfel-turo nun havus la aĝon de la tero, la farbo-tavolo sur la globo ĉe ĝia pinto reprezentus la proporcion de tiu aĝo, kiu apartenas al la homo; kaj kiu ajn

komprenus, ke tiu tavolo estis la kialo, pro kiu oni konstruis la turon. Mi supozas, ke oni komprenus tion. ĉu ne?

*Was the World Made for Man?*

**John F. Kennedy** (1917-1963), 35a prezidento de Usono

La granda malamiko de la vero tre ofte ne estas la mensogo – intenca, elpensita kaj malhonesta – sed la mito – persista, persvadema kaj iluzia.

Citata de Marty Klein en "The Sex Lies of the Religious Right," *Playboy* (jan 1996).

**Mikhail Aleksandroviĉ Bakunin** (1814-1876), anarĥiisto kaj politika teoriisto

Ni estas materiistoj kaj ateistoj, kaj tiu fakto estas nia gloro.

*Views of Religion* de Rufus K. Noyes.

**Douglas Adams** (1952-2001), verkisto

Imagu iom da akvo en kavo en la vojo. Iun matenon la akvo vekigis kaj pensas, "En kiel bela mondo mi troviĝas! En kiel bela truo mi troviĝas! La truo tre bone konvenas al mi, ĉu ne? Fakte ĝi konvenas mirige bone; evidente ĝi estis farita ĝuste por enteni min!"

citita de Richard Dawkins.

**Alice Walker** (1944-), verkisto

Kion la menso ne komprenas, tion ĝi adoras aŭ timas.

**Aristofano** (? 448-380 aK), verkisto de komedioj

Altaroj! Altaroj! Certe vi ne kredas je la dioj. Kio estas via argumento? Kie estas viaj pruvoj?

**Giordano Bruno** (1548-1600), filozofo

La vero ne ŝanĝiĝas, nur ĉar ĝin kredas, aŭ ne kredas, la plejmulto da homoj.

el *Giordano Bruno La forgesita Filozofisto*

**George Bernard Shaw** (1856-1950), dramisto

La fakto, ke kredanto estas pli feliĉa ol skeptikulo, ne estas pli bona argumento ol la fakto, ke ebria homo estas pli feliĉa ol sobro. La feliĉo de tro facila kredemo estas senvalora kaj danĝera kvalito.

George Bernard Shaw, *Androklo kaj la leono*, Antaŭparolo (1916).

**D. D. Bandiste** (1923-), raciisto

Ĉiu religio asertas idealojn kiajn "Ne ŝtelu", "Ne mensogu" kaj tiel plu. Tiuj estas normoj por ĉiu ajn civiliziginta socio, kaj ne devus esti ligitaj al iu ajn religio aŭ dio.

D. D. Bandiste, citita en *The New Sunday Express* (July 15, 2000).

**Susan B. Anthony** (1820-1906), aktivulo por virinaj rajtoj

Mi ne fidus tiujn homojn, kiuj tiel bone scias, kion Dio volas ke ili faru, ĉar mi rimarkas, ke tio ĉiam koincidas kun iliaj propraj deziroj.

Susan B. Anthony, dum kunveno pri virinaj rajtoj.

**Richard Dawkins** (1941-), zoologo

Mi kredas, ke sencohava universo, universo indiferenta al homaj zorgoj, universo en kiu ĉio havas klarigon, eĉ se ni devos ankoraŭ longe progresi antaŭ ol ĝin trovi, estas loko pli bela, pli miriga, ol universo garnita per kaprica laŭokaza magio.

Richard Dawkins, *Unweaving the Rainbow*.


Certe ni tenu malfermitan menson, sed ne tiel malfermitan, ke nia cerbo elfalas.

Richard Dawkins, en televida parolado *Science, Delusion and the Appetite for Wonder*, BBC1 Television (12 nov 1996).



Rigardante la Ĉielon





## Rigardo el la ĉielo

# Instruado de religio en la italaj lernejoj

## Historieto

*En Italujo religio estas instruata en la ŝtataj lernejoj danke al interkonsento de la Itala ŝtato kun la Vatikana ŝtato. Tiu interkonsento estis subskribita unuafoje en la jaro 1923-a de la faŝista registaro okaze de la reformo de la lerneja sistemo. Pro tio, ĉiuj (kaj laŭ mi intence) parolas pri «religio», sed fakte temas pri instruado de la katolika religio (mallongige: IKR).*

Ekde de tiam tiuj lecionoj fariĝis devigaj. Antaŭe ili estis libervolaj kaj eblaj nur en la elementaj lernejoj kaj organizataj de la apartaj komunumoj.

Per la interkonsento oni enkondukis lecionon pri religio ankaŭ en la mezajn kaj superajn lernejojn, kiel “*fundamento kaj kompletigo de la publika [ŝtata] edukado*”.

Ĝis la jaro 1984 la instruistoj estis nur pastroj aŭ monaĥoj (tre malofte ili estis instruistinoj, tiukaze ili estis monaĥinoj), sed en 1984 «maldekstruma» registaro subskribis modifon de la interkonsento laŭ kiu: “*La itala Respubliko, agnoskante la valoron de la religia kulturo kaj konsiderante ke la principoj de katolikismo estas parto de la historia riĉaĵo de la itala popolo, plucertigos, en la kadro de la celoj de edukado, instruadon de la katolika religio en la ŝtataj lernejoj je ĉiu nivelo kaj ordo, escepte de universitatoj*”.

Sed ne nur la kialo de la instruado ŝanĝiĝis. Danke al tiu interkonsento: a) instruado de la katolika religio, etendiĝas ankaŭ al infanlernejoj, b) geinstruistoj ne plu devis esti pastroj au gemonaĥoj c)

kaj, aliflanke, ĉeesto refariĝis «libervola» je ĉiu instrunivelo.

### Geinstruistoj

Laŭ la supra logiko la geinstruistoj estas elektataj de la Episkopo, kies juĝo estas nekontestebla. Tio signifas, ke la ŝtato pagas la salajron por homoj kiujn ĝi tute ne kontrolas, kaj kiuj uzas tempon kaj ŝtatan lokon por instrui particecan lecionon, ofte kontraŭajn al la laikaj principoj de la ŝtato mem.

Por teni siajn postenojn ili devas ĉiujare peti permeson el la diocezaŭtoritatoj, kiuj povas forigi ilin el la postenoj eĉ pro kialoj kiuj tute ne koncernas la instrukapablon de la geinstruistoj, ekzemple pro «... *publika morala konduto kiu mallaiŭas la instruojn de la Eklezio*”. Ekz. iu instruistino, kiu gravediĝis «neregule», estis maldungita de la episkopo. Ŝi apelaciis kontraŭ tiu maldungo, sed fine la Konstitucia Kortumo agnoskis ke la leĝo malfavoras ŝin.

Danke al leĝo de la jaro 2003 la geinstruistoj pri religioj fariĝis ŝtataj. Nun ni troviĝas en absurda situacio: episkopo dungas geinstruistojn por ŝtata posteno,

kaj kiam tiuj ne plu estas ŝatataj de la episkopo la ŝtato ne plu povas maldungi ŝin/lin kaj do ili aŭtomate fariĝas ŝtataj geinstruistoj pri aliaj studobjektoj!

### Enhavo de la instruado

Kompreneble temas pri interkonsento inter Italujo kaj Vatikano: *“IKR... estas farata konforme al la Eklezia doktrino”*. Estas evidente, do, ke leciono pri religio utilas ekskluzive al la Eklezio por instrui propran religion, kion ĝi povus fari en siaj paroĥejoj.

Same komprenebla estas la fakto ke lokaj katolikaj instancoj kontrolas *“ke tiuj, kiuj estas deputitaj kiel instruisto pri religio en la lernejoj, ankaŭ ne katolikaj, estu elstaraj pro la ĝusta doktrino, pro atesto de kristana vivo kaj pro didaktika lerteco”*.

Do instruado de ceteraj religioj aŭ aliaj moralaj konceptoj ne estas permesataj, kaj instruisto kiu kuraĝus proponi tion riskus perdi sian postenon (kaj tio nemalofte okazis).

Tamen la reala situacio estas iom pli komplika. Katolikoj enstrudiĝas en ĉiujn lerneajn aktivecojn kaj mi ne scias ĉu estas bonŝanca la fakto, ke la geinstruistoj pri katolikismo nuntempe estas ĉefe laikuloj. Kiam ili estis nur pastroj oni (ĉefe la gelernantoj) ne serioze konsideris ilin, tre malofte ili sukcesis iel interesi la homojn al siaj lecionoj, ĝenerale ili tute ne instruis, ofte ili eĉ, okupataj pro preĝejoj aferoj (morto, baptoj, ktp), tute ne venadis al lernejo. La gelernantoj uzis tiun horlecionon por fari aŭ kopii hejmtaskojn, por sin pretigi por ekzameno dum posta leciono, por okulumi samklasanon, por iel ajn sin distri, ktp...

La laikuloj estas iom pli insidaj. Ofte ne ekzistas diferenco inter iliaj lecionoj kaj la pastraj : gelernantoj daŭre sin distras dum iliaj lecionoj. Sed plej ofte ili aktivigas tiamaniere ke la homoj (gelernantoj kaj geinstruistoj) opinias ke ili ne instruas katolikismon, sed universalajn moralajn valorojn kaj eĉ la principojn de la ceteraj religioj. Nu kio okazas? Ili minimume prezentas sin kiel amikon kaj diskutas pri ĝeneralaj sociaj temoj (rilato inter gejunuloj, amproblemoj, aborto, genaj esploroj, nuntempe eĉ origino de la homo) neniam dirante ke ili parolas el la katolika vidpunkto kaj do la gelernantoj konvinkiĝas ke tiu vidpunkto estas absoluta, tute ne ekzistas solvo malsama je tiu prezentata de la instruist(in)o.

Bedaŭrinde ili eĉ ne instruas Bibliion, do la gelernantoj nenion scias pri la multnombraj kontraŭdiroj internaj kaj eksteraj, tio estas rilate la dirojn de la geinstruistoj (aŭ de la Eklezio, entute).

Alia ilia agado okazas preskaŭ ekster la propra klaso. Ĉar ili havas ĝis 18 klasojn, ili sin proponas kiel kunrespondecojn de tutlernejoj projektoj pri io ajn (ekz. studesploro pri evoluado, studvojaĝoj, ks). Ĉamaniere ĉiuj gelernantoj partoprenas tiujn projektojn do eĉ la gelernantoj kiu decidis ne «ĝui» religian instruon (mi klarigos kiamaniere tio eblas). Feliĉe ofte tiuj gelernantoj kiuj estas pli konsciaj pri siaj «religiaj» starpunktoj ol la ceteraj homoj.

La pastroj ne malaperis: pastro en la jaro 2000a konfesis la gestudentojn dum siaj lecionoj.

### Gelernantoj

Gelernantoj ne estas devigataj ĉeesti. Laŭ la interkonsento ili rajtas “*ne profiti, ne ĝui*”: kvazaŭ tio estus neperdinda bonŝanco!

Ili havas tri elektablecojn:

1. *partopreni alternativan lecionon.* Kvankam oni rajtas postuli ke oni organizu tiujn lecionojn, gepatroj kaj gelernantoj plej ofte rezignas, ĉar praktike tio estas ebla nur en treege malmultaj lernejoj, pro la aldonaj kostoj, kiuj superŝarĝus la lernejajn bilancojn;
2. *dediĉi tiun horlecionon al studo de aliaj studobjektoj.* Ankaŭ ĉiokaze, tio povas teorie okazi kun la subteno de aliaj instruistoj, kiuj fakte ne estas je dispono ĉar okupataj en aliaj klasoj; plie malfacile troveblas tiucele taŭga loko;
3. *eliri el la lernejo.* Fakte ekzistas neniu devigo partopreni la alternativan lecionon, kiel la Konstitucia Kortumo aŭtoritate sankciis en la jaro 1989-a substrekante la superan principon de la konstitucia laikeco de la ŝtato. Pluraj gepatroj ne favore akceptas ke iliaj gefiloj eliru la lernejon: oni povus facile solvi la problemon metante la IKR je la komenco aŭ je la fino de la tagaj lecionoj, sed ĉi tiu solvo, kiu verŝajne tre malpliigos la partoprenantojn je IKR, frontas malkonsenton de la katolika Eklezio.

### Katolikoj ĉiel strebas al trudado de katolikismo en la lernejoj

Mi jam tuŝetis kelkajn problemojn kiuj fakte malhelpas liberan decidon ĉu partopreni tiujn lecionojn ĉu ne.

Fakte la situacio estas iom pli malsimpla. La Eklezio ĉiumaniere klopodas havigi gelernantojn al siaj geinstruistoj. Mi jam menciis la projektojn. Sed ankaŭ alimaniere kaj pli oficiale malhelpas «liberecon».

Je la fino de la supera lernoperiodo gelernantoj, superinte la finan ŝtatan Ekzamenon, ricevas diplomon kun poentoj ekde 60 ĝis 100. Nu, ministeria ordono de la jaro 1999a deklaris ke studo de IKR aŭ de alternativa leciono povas kontribui al la tiel nomata “*lerneja kredito*”, kiu estas baza parto de la fina poentaro.

Kompreneble, ĉar alternativaj lecionoj fakte ne ekzistas, oni instigas al partopreno al IKR lecionoj. Do, kontraŭ tiu ordono, kiu kontraŭstaras ankaŭ kelkajn verdiktojn de Konstitucia Kortumo, leviĝis pluraj protestoj kaj ekestis apelacio. La apelacion oni rifuzis per “*kapricecaj*” motivaĵoj, el inter kiuj la plej absurda estas la fakto ke la apelaciantoj “*ne informis la kontraŭulojn*”, tiuj estas ... ĈIUJN partoprenantojn de IKR!

Nu, ekzistas pluraj solvoj: enslipigo de kialoj nepartopreni, deviga enkalkulo de la religiaj studhoroj en la ĝenerala studkariero, malhelpo ŝanĝi elekton dum la sekvaj jaroj, ktp ...

Eĉ la horartabelo estas rimedo por entrudi religion!

Lokigo je la fino aŭ komenco de la klashoraro faciligas fuĝon de la gelernantoj. Do, post pluraj minacoj de la Itala Episkoparo, IKR estas, laŭeble, meze de la horartabelo, kvankam la ekleziaj hierarkioj en la estinteco, kiam IKR estis deviga, permesis ke la prireligiaj lecionoj estu je la komenco de la taga klashoraro, por ke la tuta tago estu markita per Fido.

## **El studenta vidpunkto: religio en italaj lernejoj**

Hodiaŭ mi parolos iomete pri mia sperto kiel itala studento rilate al la instruado de religio en italaj lernejoj. Kiel vi eble jam scias, en italaj lernejoj estas lecionoj de religio kutime instruataj de pastroj, kiuj prezentas la katolikan religion kiel veron. En la pasinteco tiuj lecionoj estis devigaj, sed en 1983 la itala ŝtato subskribis novan interkonsenton kun Vatikano pri la rilato inter la religio kaj la ŝtato, kaj kadre de tio oni decidis ke studentoj (aŭ iliaj gepatroj) devas havi la eblecon rifuzi partopreni en tiaj lecionoj.

Persone, mi iris al internacia lernejo ĝis mi havis 13 jarojn, sed poste mi komencis iri al ŝtata itala lernejo, kaj tie prezentiĝis la problemoj. Mi decidis ke mi ja volas partopreni en la lecionoj de religio, kvankam mi estas ateisto, ĉar dum la lecionoj mi povos stariĝi kaj klarigi kial mi malkonsentas kun la pastro.

La unua afero kiun mi malkovris, estas ke la lecionoj pri religio estas prenataj serioze nek de la studentoj nek de la instruistoj. Parto de la kialo estas ke la studentoj ne ricevas verajn poentojn pri religio, kaj neniu atendas ke ĝi estu studata kun seriozeco. Fakte, la nura horo en la semajno kiu estas dediĉita al religio estas konsiderata preskaŭ kiel libera horo: la studentoj sentas sin tute liberaj fari la hejmtaskojn por alia fako dum la leciono, aŭ babili inter si, aŭ legi revuojn pri muziko. La pastroj mem ofte alvenas malfrue, aŭ en ekstremaj kazoj tute ne alvenas, kaj kiam ili instruas ili kutime tute ne sekvas la programon, sed komencas babili kun la studentoj pri la novaĵoj, aŭ pri la signifo de la vivo, aŭ pri kio ajn ve-

nas al ilia kapo. Nur tre malofte ili vere provas instrui al la studentoj pri la Biblio, sen ke iu ajn tre atentus.

La unua pastro kiun mi havis estis tre reakcia, kaj kelkfoje dum la lecionoj li esprimis opiniojn kiuj laŭ mi estas neakcepteblaj en la kunteksto de ŝtata lernejo. En unu okazo, li neis ke la homoj devenas de simioj (eĉ Vatikano ne plu tenas tiun pozicion). En alia okazo, li klarigis al la klaso ke ĉiuj pozitivaj valoroj en la mondo devenas de la Biblio, ekzemple la valoroj ke oni traktu aliajn homojn laŭ bona maniero, ke oni ne mortigu, kaj ke oni rilatu al la socio en civilizita kaj deca maniero. Li asertis ke se la Biblio ne ekzistus, ankaŭ tiuj valoroj ne ekzistus en la nuna mondo. Mi demandis al li, ĉu ateisto ne povas havi tiujn pozitivajn valorojn, kaj li respondis ke se temas pri ateisto kiu kreskis en kristana socio tiam eblus, sed se temas pri iu kiu ne kreskis en kristana socio tiam ne estas espero. Li diris ke sufiĉas rigardi la mondon por rimarki ke li pravus: en islamaj landoj homoj nur mortigas unu la alian, en ateismaj komunistaj landoj same, nur en kristanaj landoj la homoj vivas en civilizita maniero kaj respektas unu la alian. Plej maltrankvilige, estis kelkaj studentoj kiuj ŝajnis konsenti kun li.

En postaj jaroj, mi ankaŭ estis instruata de alia pastro kiu estis pli malfermita kaj inteligenta, ĉar nature ankaŭ la instruistoj pri religio ne estas ĉiuj samaj.

Mi kredas ke estas anakronismo ke religio ankoraŭ estu instruata en tia maniero en italaj lernejoj, kaj nun kiam ektroviĝas multaj studentoj kiuj estas

## Heredu la venton'

La plej eminenta evento en la historio de la instruado pri evoluado laŭ la teorio de Darwin estis la proceso nomata «la simia», kiu okazis en Tennessee dum la 20-aj jaroj de la lasta jarcento. Instruado de biologio kaj liberpensanto Scopes defiis al ŝtatleĝa malpermeso kaj instruis la teorion de Darwin. Leĝe persekutita, li dungis advokaton Clarence Darrow, kaj la ŝtato Tennessee dungis William Jennings Bryan. Bryan estis pli impona ol lia hodiaŭa reputacio indikas: li estis la politika defendanto de laboristoj kaj de «la malgranda homo», tri fojojn por-prezidenta kandidato por la Demokratia partio, ŝtatestretario por Prez. Woodrow Wilson (la plej impona intelektulo-prezidento de la jarcento), kaj la plej admirata oratoro siatempa. Darrow ankaŭ estis admirata oratoro kaj, kontraŭ lia nuna reputacio, ĉefe defendanto de riĉuloj kaj grandegaj entreprenoj.

En la proceso Darrow plene detruis Bryan-on. Li alvokis lin por atesti kiel spertulo pri la Biblio, kaj Bryan konstante kaj kontraŭdire respondis, «Se estas en la Biblio, devas estis vera, do, mi kredas ĝin.» La fina rezulto de la proceso estis, ke evoluado laŭ Darwin ne nur povis esti instruata ĉie en Usono, sed ĝi devis esti instruata ĉie dum jardekoj.

Restis kredantoj je la biblia fabelo, sed ili devis regurdi Darwinismon en la klasĉambro. Nur kiam Ronald Reagan elektiĝis prezidento en 1980 tiuj kredantoj kuraĝis reaserti sian kredon. Ili mallerte renomis sian kredon «Laŭscienca kreis-


<sup>1</sup>Noto de la Redaktoro: Kvankam la aŭtoro ne diris titolon por sia artikolo, la eventoj de li citataj estis rakontitaj en filmo samnoma kaj direktita de Stanli Kramer kaj ĉefaktorigita de Spenser Trejisi je 1960.

mo», sed ĉiuj kortumoj malagnoskis tion kiel sciencan. Tamen, estas miloj da lernejoj en Usono, do, la malagnoskado daŭris du jardekojn.

Lastatempe la samaj kredantoj pli lerte enomis sian kredon «Inteligenta projekto», kiu ekstrairas la kortumaron. Tiu «teorio» ne ĝuas pli da apogo ol antaŭaj, do, mi ne atendas pli da sukceso. Tamen, la energio kaj fikredemo riskas bremsi progreson en diversaj kampoj, ekz. studado de ŝelterapio por medicinaj celoj, por ne menciigi la rajtojn de virinoj, ekz. decidado por si mem pri abortado.

Arnold VICTOR.  
New York City, i. e.,

<arvimide2@earthlink.net>



Venas el paĝo 13a

gefiloj de enmigrintoj kun aliaj religioj, mi esperas ke oni finfine decidus ŝanĝi la sistemon. Laŭ mi estus multe pli bone havi ordinaran instruiston kiu instruas al la studentoj pri la malsamaj religioj de la mondo, el laika vidpunkto.

Gabriele Corsetti

## L'medalo al l'papo

Hontu pro l'medalo al l'papo  
Ideon nian ne honoras  
De ĉie voĉoj hie horas  
Hontu de l'piedoj ĝis kapo

Papo publike neniomas  
Multopo aĝas eĉ pli inde  
Bonkore, malpli soci-blinde  
Papo el homaro nur homas

Aborto-matrajton li votas  
Libera amo lin ne muzas  
Aides' lin predi rifuzas  
Nave nur sutanoj erotas

Ne al lia rigor-edeno,  
Nek transa ĉiel', profabela.  
Lin, ĉar l'urbi-orbi-babela  
Gratulis pro l'gurdjara beno

Pseŭdo-moralon fie sarkis,  
Al okulo movad-ekstera,  
Esperanton bigot-aspekta  
Fondumo panegire farbis

Malpace tondras l'mondo pia  
Sensenulo, infan-soldato  
Ĉar premas vin la surrogato,  
Ne tro kredu je l'bono dia

Galileo al galaksioj  
Tralensis ĉu diaĉo sidus  
Pri l'medala ŝerc' bone ridus  
Tie ne hejmas religioj

Pentu pro l'medalo al l'papo  
Laiidiĝis maltolero lia  
Uekiĝas malaprobo nia  
Pentu de l'piedoj ĝis kapo

*C. Rivière*

### Notoj :

1 Zamenhofa Fondumo, en 1999, atribuis la Medalon de Toleremo al la papo Johano Paŭlo la 2a, pro la jena merito : «heroldo de eku-menismo, do de toleremo interreligia, ...» (intercitle eltirao de la parolado de S<sup>o</sup> Zaleski-Zamenhof, prezidanto de la Fondumo, en Florenco okaze de la 91a UK).

2 Galileo : itala fizikisto, astronomo (1564-1642). Sian tutan vivon, li trovis faktajn okazojn informiĝi pri la eklezia toleremo.



# Ateismo \_\_\_\_\_

# \_\_\_\_\_ Organo de ATEO

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,  
E30080 MURCIA,  
HISPANIO**

**Retskribu al  
jesuo@ono.com**

### *GRAVAJ NOTOJ:*

- 1 Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.
- 2 Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni  **citu la originon**.
- 3 Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.
- 4 Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Kotizo: 15 eŭroj jare.

### ***Estraro de ATEO***

*Prezidanto:* **Claude Nourmont**, el Luksemburgio.

*Vizprezidanto:* **Neil Blonstein**, el Usono.

*Sekretario:* **Yves Bellefeuille**, el Kanado.

*Kasisto:* **Dieter Rooke**, el Svislando.

*Estrarano:* **Anna Lowenstein**, el Italio.

*Redaktoro:* **Jesuo de las Heras**, el Hispanio.

*Redakto-*

*helpantoj:* **Christian Rivière** kaj **Dominique Simeone**, el Francio.

*Provlegado:* **Norman Noon**, el Luksemburgio.



Kovrilo: Nia kunveno en Litovio.